Ernst Anschütz,

Abio vi

tradukita de Paul Gottfried Christaller

Abio vi, abio vi,
kun foliar fidela!
Vi verdas ne nur en somer',
sed eĉ dum vintra neĝa ter'.[2]
Abio vi, abio vi,
kun foliar fidela!

Abio vi, abio vi,
Al mi tre multe plaĉas.
Ho, kiom ofte ĝojis mi
en la kristnaska bril' be vi!
Abio vi, abio vi,
Al mi tre multe plaĉas.

Abio vi, abio vi,
instruon donas bonan:
Espero kaj la konstantec'
konservas forton de junec'.
Abio vi, abio vi,
instruon donas bonan.

...

[2] aŭ:
sed eĉ dum vintra neĝ-veter'.
Tiun version de tiu ĉi linio mi, Manfred Retzlaff, iam aŭdis.

Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de Ernst Anschütz *(∗1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de* Paul Gottfried Christaller *(∗1860-08-21 – †1950-12-31).*

Arg-593-1455 (2012-12-13 18:37:04)

Tiu ĉi esperantigo de la kanto troviĝas en la retejo `http://kantaro.ikso.net/das_deutsche_lied_in_esperanto` *sub* `http://kantaro.ikso.net/abio_vi`. *Ĝi aperis unuafoje en la kant-libro SSas e*